


*VEGO* estas nova
gazeto por
* bestaj rajtoj
* homaj rajtoj
* media protektado
en la sola vera internacia
lingvo - ESPERANTO

ENHAVO

Aferoj tra la mondo
Amnestio Internacia
Universala Esperanto-Asocio
Adresoj de organizaĵoj
Tutmonda Esp. Veg. Asocio
Kial Esti Vegetarano?
FRAME
Eventoj
La Radio
Korespondantoj

# vego

## GAZETO PRI AFEROJ VEGETARANAJ KAJ MEDIAJ

No.1 SOMERO 1993.

BONVENU! Ni elsendas ĉi tiun gazeton al multaj homoj tra la mondo. Ni esperas, ke vi volos helpi nin por disvastigi la ideojn, principojn kaj metodojn de kaj homrajtoj, bestrajtoj kaj media protektado.

VEGO, ni kredas, estas la sola internacia esperanta gazeto, kiu penos kombini la idealojn de kaj vegetaranismo kaj homa kunlaborado kaj media protektado.

VEGO subtenos multajn el la celojn de la vegetaranaj asocioj, la homaj rajtoj kaj la verdaj asocioj tra la Mondo, tamen ni ne subtenos kelkajn el ilia agadoj; ekzemple, la bestajn eksperimentojn por io ajn, aŭ la nenecesan ĉasadon aŭ farmadon de bestoj. Tial, ni ne ĉiam konsentos kun multaj verduloj aŭ kelkaj homhelpoj grupoj.

VEGO ekzistas por helpi samideanojn disvastigi internacie la ideojn, kiujn ni menciis supre. Ni petas, sendu rilatajn informojn pri eventoj, novajoj, grupoj, gazetoj. Ni uzos mallongajn artikolojn pri rilataj temoj. Se vi deziras korespondi kun samideanoj, sendu vian nomon, adreson, ktp. Estas senpaga! Ni bezonas pli multajn abonojn por plibonigi la gazeton, kaj disvasti pli bone la informon al pli multaj homoj.

---

**VEGO estas la gazeto de la VEGETARANA ESPERANTO GRUPO**
**ADRESON;**
**Brian W. Burnett, VEGO, Nant Yr Hafod Cottage, Llandegla, Clwyd LL11 3BG, Britio.** *(tel. 0978.88442)*

### AFEROJ TRA LA MONDO

Ni uzas multajn fontojn, kaj multaj eroj troviĝis en kelkaj bultenoj aŭ gazetoj. Ni petas, diru al ni kiaj aferoj okazis en via lando antaŭ nelonge. Ni havas multajn erojn el Britio, sed ni mankas erojn el aliaj landoj. Sendu informon el via lando, prefere verkita esperante, tamen ni povos traduki el la germana, franca, hispana, nederlanda aŭ rusa lingvoj - kaj eble aliaj lingvoj.

**INTERNACIE**

* Jaro post RIO; Kio okazas? La Bio-diverseca Traktato bezonas 30 landojn, kaj nur 14 subskribis ĝis nun, kaj lUsono, per Bill Clinton, subskribos baldaŭ. Ĉu la Traktato malsukcesis?

* La internacia Tropika Ligno Konsento ne kuraĝiĝas, ĉar la komercoj kaj registaroj de la riĉaj landoj daŭras ekspluati.

* 1990 = plej varma jaro ĉiam; 1991 = la tria plej varma jaro; kaj la dek jaroj ĝis1992 unu el la plej altaj dek jaroj.

* Internacia Konferenco pri Nutro, fine de 1992, pretendis, ke 786 milionoj da homoj estas daŭre malnutritaj, kaj mankas al 2 miliardoj necesaj mineraloj kaj vitaminoj.

* Eŭropo kaj Usono superregas la Ĝeneralan Konsenton pri Komerco kaj Tarifoj. Estas 108 anoj, kaj du trionoj estas malriĉaj landoj, sed ili ne povas gajni justajn konsentojn, ĉar ili ne havas la komercan fortecon.

Dum la Mondo havas sufiĉan nutraĵon por ĉiuj homoj, miliardo malsatas. La konsentoj inter Eŭropo kaj Usono kaŭzas malfacilojn por la aliaj. La riĉaj landoj subvencias iliajn agrikulturajn aĵojn, tial la malriĉaj landoj ne povas vendi iliajn aĵojn, do ili iĝas pli malriĉaj, kaj la ŝuldoj kreskas.
La situacio iĝas pli malbona, ĉar la malriĉaj homoj havas pli multajn infanojn, do la loĝantaro kreskas, sed la medio iĝas malriĉa, kaj la plantoj ne kreskas bone .... do la homoj iĝas pli malriĉaj .... Dum 1960, la plej multaj landoj el Afriko povis manĝi sufiĉe, sed ili malsatas ofte ĝis morto.

* 'Typhoo', kiu vendas teon, proponas novan interkonsenton pri justa vendado, kaj la kompanio zorgos pli multe pri la medio kaj la laboristoj.

* 'NESCAFE', kiu vendas kafon kaj multajn aliajn aĵojn, suferis malpli de vendado, ĉar multaj homoj bojkotis la komercon, kiam ĝi ekvendis sekigitan lakton por beboj al malriĉaj landoj.

.... TRA LA MONDO ....

* PAPERO; Oni uzis Kanaban fibron por fari ŝnurojn, paperon kaj tukojn, sed komercoj poste uzis aliajn ŝtofojn. Tamen, nun kelkaj komercoj uzas ĉi tiujn fibrojn por produkti paperon, kaj la uzado kreskas. Bedaŭrinde, la maŝinaro estas malsama, do la ŝanĝo al kanabo estas malrapida. Kanabo havas malpli da pestoj ol multaj aliaj plantoj (ekzemple, arboj), kaj la planto kreskas kvaroble pli rapide ol arboj. Kompreneble, registaroj ne ŝatas kanabajn plantojn, ĉar iuj specioj estas misuzataj...

* Homoj detruas tage 70 mil hektarojn da tropikaj arbaroj.

* Sciencistoj malkovris novan grupon de 350 maloftaj Mediteraneaj fokoj apud la marbordo de Okcidenta Saharo.

* Ozona-tavolo super Eŭropa malkreskis 9-20% dum la unuaj tri monatoj de 1993.

* Internacia Konferenco pri Nutro, fino de 1992, pretendis, ke 786 milionoj homoj estas daŭre malnutritaj, kaj mankas al 2 miliardoj la necesaj mineraloj kaj vitaminoj.

* Eŭropo kaj Usono superregas la Generalan Konsenton pri Komerco kaj Tarifoj. Estas 108 anoj, kaj du trionoj estas malriĉaj landoj, sed ili ne povas gajni justajn interkonsentojn, ĉar ili ne havas la komercan forton. Dum la Mondo havas sufiĉan nutraĵon por ĉiuj homoj, miliardo malsatas. La konsentoj inter Eŭropo kaj Usono kaŭzas malfacilojn por la aliaj. La riĉaj landoj subvencias siajn agrikulturajn produktojn, tial la malriĉaj landoj ne povas vendi siajn aĵojn, do ili iĝas pli malriĉa, kaj la ŝuldoj kreskas. La situacio iĝis pli malbona, ĉar la malriĉaj homoj havas pli multajn infanojn, do la loĝantaro kreskas, sed la medio iĝas malriĉa, kaj la plantoj ne kreskas bone .... do la homoj iĝas pli malriĉaj .... Dum 1960, plej multaj afrikaj landoj povis manĝi sufiĉe, sed nun la homoj malsatas ofte ĝis morto.

AFRIKO

* RWANDA. La milito en Rwando minacas 300 montajn gorilojn. Nun nur 650 montaj goriloj ekzistas en la mondo.

* ETIOPO; Kamparanoj faligis 50% el la 23k hektaraj de la Ademain arbaro dum la 18 monatoj, de kiam la diktatoro falis dum 1991. Etiopo perdis 500 mil hektarojn, kaj nun la dezerto kreskas rapide. 20% el la 50 milionoj da homoj malsatas, kaj perdas pli ol miliardo da tonoj da grundo jare. La lando perdis 90% el la arbaroj de 1900.

* En Etiopo, malpli ol 20% el la homoj povas legi kaj verki.



.... tra la mondo ....

AZIO;

* Anapurna Protektada Regiono; lokaj Gurkoj plantas arbojn, kaj penas purigi la fiaĉojn, kiujn la turistoj lasis, kaj ili nun proponas, ke la turistoj pagus por viziti la lokon, per imposto. Nepal ricevas 17% el ĉiuj komercoj de la 250k turistoj. 10% el la homoj gajnas 47% el la landa enspezo, kaj 43% estas malriĉa.

HINDIO;

* TIGROJ; 30k en 1940, 2.5 mil en 1990, kaj la nombroj malkreskas per ĉasoŝtelado kaj perdo de kreskejo.

* La Monda Banko ne helpos la Narmadan Digon, ĉar homrajtaj organizaĵoj kontraŭstaris la aferon, sed la Hindia Registaro eble daŭros konstrui la digon. Pli ol 250,000 homoj perdos siajn hejmojn, kaj iom da viroj kaj virinoj minacas memmortiĝi. La registaro jam transloĝigis multajn familiojn al lokoj, kie la grundo estas malriĉa. La lokaj homoj plendas, ke la riĉaj homoj en la urboj profitos per la akvo kaj elektraforto, sed la malriĉaj homoj en la kampoj malprofitos kaj iĝos pli malriĉaj.

ĈINIO; Homoj gajnas pli multajn monon kaj aĵojn, kaj la komerco kaj polucio difektas la medion kaj la sovaĝajn bestojn kaj plantojn. Ĉinio uzas pli multan karbon ol iu alia lando, kaj la milionoj da fridujoj uzas 'CFC' kemioj, kiu difektas la atmosferan ozononon.

TIBET: Ĉinio okupas Tibeton de 1949, kaj nun la lando enhavas 7.5 milionoj da Ĉinajn homojn kaj 6 milionoj da Tibetajn. Ĉinio rabis la landon, la arbarojn kaj la homojn, kaj la Tibetaj homoj petas helpon.

**Sendu informon el via lando, ni petas.**

EUROPO

* La Konsilantaro de Eŭropo proponas, ke kompanio, kiŭ kaŭzas polucion, devus pagi la elspezojn por bonordigi la difekton.

* La Eŭropa Komisaro kunvenis por proponi energian imposton, sed multaj komercoj kaj alilandanoj, kiuj uzas aŭ produktas oleon, kontraŭas la proponojn.

* OZONO; 25% el la ozono en la atmosfero detruiĝis super nord-okcidento Europo dum vintro 1992/3. Ankaŭ en 1991/2.

* PONTO DE SVEDO AL DANLANDO; Planoj estas prokrastitaj pro timo pri polucio.

* GERMANIO: Opinia baloto = 69% deziras best-protektadon en la stat-konstitucio.

**Lau la Monda Almanako, pli ol 2 milionoj da homoj parolas Esperanto**

*.... tra la mondo ....*

* ITALIO; Opinia baloto = 94% deziras respekton de bestoj; 45% deziras halti tute vivisekcion; 40% kontraŭas bestĝardenojn.

* La 'Green Magazine' el Britio, rakontis pri la grandegaj mediaj detruoj per la korupto en la Italia Registaro. Ekzemple, oni diris, ke homoj disponis grandegajn kvantojn de toksaj forĵetaĵoj en la medio.

* GREKIO Ekologiaj grupoj kontraŭas la proponitan digon je la Rivero Acelus.

* BELGIO; Guy Lugen, Media Ministro fortigis legojn por malpligi kruelecon de ĉasado de bestoj.

* Oni devos pagi median imposton de 1994, precipe je ĉiuj aĵoj, kiuj havas nereuzeblajn pakaĵojn.

* HISPANIO; Opinia baloto = 87% kontraŭas bovbataladon, kaj 60% opinias, ke bovbataladon donas malbonan figuraĵon de Hispanio.

**SENPAGAJ ANONCOJ en VEGO!**
Jes, ni presos senpage viajn malgrandajn anoncojn pri viaj best- au hom- rajtaj asocio, klubo, organizaĵo!

* NEDERLANDO; La registaro proponas novajn legojn por postuli reuzadon de ĉiuj aŭtomobiloj kaj eroj post 1994. La registaro deziras atingi la celon de 60% reuzado de ĉiuj forĵetaĵo de 2000.

* EUROPO; La EC proponas postuli, ke komercoj, kiuj difektas la medion, devus pagi kompenson.

* IRLANDO; Dum 1992, *Cygnus cygnus* bredis unufoje en Irlando.

EUROPO: Sciencistoj studis malsamajn specojn de cignoj en Ruslando kaj Britio, ĉar la birdoj flugas jare al Ruslando por bredi, kaj al Britio dum la vintro. Observistoj notis cignojn kun markringoj de Ruslando en Estonia, Danmarko, Nederlando, Lituanio, Germanio, Irlando kaj Britio.

* La amerikana ruĝa anaso minacas la internacie maloftan blankkapan anason, kiu loĝas Hispane. La ruĝa anaso liberiĝis en Britio, kaj nun loĝas tra multaj lokoj en Europo. Ĝi estas pli atakema ol la blankkapa, kaj ankaŭ interbredos.

* La blankkapa anaso minaciĝis ankau en Turkio, kie multaj viroj pafas ĉiujn birdojn.

FINLANDO;
* Subspeco de la foko, *Phoca hispida*, minaciĝas per somerajn domojn apud Lago Saimiaa, Finlando



# amnestio internacia

Miloj de homoj estas en karcero pro siaj konvinkoj, multaj el ili nek formale akuzitaj nek procesitaj. Oftas torturo kaj mortpuno. En multaj landoj viroj, virinoj kaj infanoj 'malaperas' post formala aresto. Ankoraŭ aliajn oni mortigas sen eĉ ŝajnigo de jura proceso, elektitajn kaj murditajn de la stato kaj de ĝiaj poragantoj.

Tiuj fifaroj, okazantaj en landoj de plej diversaj ideologioj, postulas multnacian reagon. La protekto de la homaj rajtoj estas universala respondeco, transpontanta ĉiujn limojn de nacieco, raso kaj ideologio. Tia estas la fundamenta kredo sur kiu baziĝas la laboro de 'Amnesty International'.

KIO ESTAS AMNESTIO?
Amnestio estas sendependa mondvasta organizaĵo. Ĝia specifa rolo estas la internacia respekto de la homaj rajtoj. Ĝia agado fokusiĝas, ekskluzive ĉe la malliberuloj;
* Ĝi alstrebas la liberigon de la prokonsciencaj arestitoj. Tiuj estas homoj arestitaj ie ajn pro sia kredo, haŭtkoloro, sekso, etna deveno, lingvo aŭ religio, kondice ili nek uzis nek rekomendis perforton.
* Ĝi laboras por justa kaj baldaŭa proceso por ĉiuj prokonsciencaj arestitoj kaj fvaore al la personoj arestitaj sen formala akuzo aŭ proceso.
* Ĝi kontraŭstaras la mortpunon, torturon, kaj aliajn kruelajn, nehumanajn aŭ maldignajn traktojn aŭ punojn de senescepte ĉiuj malliberuloj.

KIU APOGAS AMNESTIO?
Amnestio havas mondvastan aktivan membraron. Ĝi havas pli ol 500,000 membrojn, abonantojn kaj subtenantojn en pli ol 150 landoj. La movado estas alirebla por ĉiu, kiu favoras ĝiajn celojn. La membroj estas el ĉiuj sociaj grupoj, posedas tre diversajn opiniojn, kaj estas invititaj partopreni la aktivecojn de ĝiaj multaj agadoj.

KIEL FUNKCIAS AMNESTIO?
Tuj kiam Amnestio informiĝas pri politika aresto, aŭ pri homo minacata de torturo au ekzekuto, ĝi unue klopodas konstati la faktojn. En la Internacia Sekretariato niaj esploristoj kolektas kaj kontrolas ĉiun haveblan informon por atingi profilon de la kaptitoj kaj la cirkonstancojn de ilia aresto. Tiam komenciĝas la agado por ilin helpi.

AMNESTIO TRA LA MONDO
Ekzistas mondvaste nun pli ol 3,000 lokaj grupoj en pli ol 40 landoj. Unika trajto de tiuj grupoj, emfazanta la principon de *internacia* laboro, kaj ĉiu grupo laboras por la arestitoj ĉiam el alia lando ol la sia.

---

**Internacia Sekretariato,**
**AMNESTIO INTERNACIA,**
**99-119 Roseberry Avenue**
**LONDON EC1R 4RE**
**(tel;071.814.6200)**

## ESPERANTO

"... ju pli vi uzos ĝin, des pli da eblecoj vi malkovros kaj des pli da plezuro vi ricevos. " (El la 'Manlibro por novaj membroj, UEA).

La **Universala Esperanto-Asocio** estas la hejmo de la internacia movado. Ni devu kotizi, kaj subtenu la lingvon por helpi disvastigi ĝin. **UEA bezonas vin!**

UEA havis 50 aliĝintajn landajn asociojn. Ĉiu devas havi minimume 25 membrojn, kaj montri konstantan aktivecon por Esperanto; tamen, la UEA havis ankaŭ pli ol 8,000 individuajn membrojn en 113 landoj, kaj la kotizoj de ĉi tiuj membroj konsistigas 45% de la enspezoj de UEA. UEA bezonas niajn kotizojn por disvastigi la lingvon mondvaste, kaj via landasocio bezonas vian kotizon por disvastigi la lingvon en via lando.

Por kotizi UEAn, plej bone informu vian landan asocion; alie, vi povas skribi al UEA por demandi la koston. Ni petas, sendu respondkupon. Estas kelkaj kategorioj de membreco - de tre malmultekosta al la ĉefa kategorio, de kiu vi ricevos la revuon *'Esperanto'*.

*'Esperanto'* estas tre interesa monata gazeto pri la mondo de Esperanto, sed la komencanto trovos legi malfacile la artikolojn. Tamen, ni rekomendas vin pripensi pri la ebleco.

ADRESON DE UEA;
**UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.** *(tel.3110.436.10.44)*

La Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) estas oficiale parto de UEA, sed ĝi havas siajn propajn strukturojn. Kompreneble, la membroj aĝas malpli ol 30 jaroj. Estas preskaŭ 1000 individuajn membrojn, kaj 33 landajn sekciojn. TEJO eldonas la revuo *'Kontakto'*, kiu estas por junularoj. *'Kontakto'* havas multajn artikolojn, kiujn ĉiuaĝaj komencantoj trovos taŭgajn.

La UEA *'Jarlibro'* enhavas informon pri ĉiuj esperantaj aferoj. Vi ricevos la *'Jarlibron'*, se vi kotizus al UEA.

La UEA organizas ĉiujare la Universalan Kongreson (UK) (UK ne estas 'United Kingdom!!), kiu ĉiam alligas tri aŭ 4 mil homojn el pli ol 100 landoj. Je 1993, la 78-a UK okazos en Valencia, Hispanio, dum 24-31 Julio.

---



### Ni elektis organizojn, kiuj ni trovis utilajn aŭ helpemaj

# ADRESOJ -

Estas multaj societoj kaj gazetoj pri temoj verdaj, ekologiaj, best- kaj hom-rajtoj, ktp., kaj estas multaj homoj, kiuj pripensas pri ĉi tiuj temoj; sed estas pli pli multaj aliaj homoj, kiuj aŭ ne pripensas aŭ ne povas helpi. Ni devu lerni pri la temoj, kaj kunlabori kun alilandanoj, por instrui kaj persvadi ĉiujn zorgi pri rajtoj de bestoj kaj homoj, kaj pri la media protektado. Legu gazetojn; lernu Esperanton; korespondu kun alilandanoj; eltrovu la realecojn hejme kaj alilande.

**** Skribu Esperante al ĉiuj por stimuladi la lingvon!! ****

Kiam vi skribas alilande al iu organiso, sendu internacian respondkupon!

---

UZANTA, AU HELPEMA AL, ESPERANTON

* VERDire, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 ANTWERPEN, Belgio. Gazeto pri mediaj aferoj tutmonde - tute esperante. Abono (4 numeroj); 370 Belgaj frankoj. (Britanoj; sendu £5 monbileton).
* Vegan Views, 6 Hayes Avenue, Bournemouth BH7 7AD, Britio. (Albonon; £2.40 de Britio; £3 de Europo; £5 alilande) La gazeto diskutas angle tutmondajn vegetalistajn temojn. La redaktoro parolas flue esperanton.
* VEGFAM, 'The Sanctuary', nr.Lydford, Devon EX20 4AL. Donas helpon al malriĉaj homoj en malriĉaj landoj por kreski plantan nutraĵon. La homoj ĉe VEGFAM parolas Esperanton!
* MOVEMENT FOR COMPASSIONATE LIVING; 47 Highlands Road, Leatherhead, Surrey KT22 8NQ. Subtenas vegetalismon, pacon, arbaran plantadon, median protektadon, ktp. Eldonas literaturon esperante kaj angle pri ĉi tiuj temoj.
* EKOLOGIO KAJ ESPERANTO (EKES), 38 Rue Jean Moulin, F-33220-Ste Foy la Grande, Francio. Novan (Julio 1992) societo por stimuli ekologiajn agojn kun esperanto.
* EKOROPA, 42 rue Sorbier, 75020 Paris, Francio. Ekologio asocio kun multaj korespondantoj alilande.
* Wolfgang Gunter, Internacia Ekologia Centro, Schulstr, 7 D-W-3501, Ahnatal 1, Francio. Konstruas (Julio 1992) monda ekologia centro. Esperanto estas la oficiala lingvo.

---

## Adresojn de societoj, kiuj ne uzas kutime Esperanton.

VEGETALISTAJ SOCIETOJ:

* Veganoj Internaciaj; Vidu la Nederlandan adreson

* Kristel de Geest, Hoge Vesten 3, Bus 4, 9300 AALST, Belgio.

* The Vegan Society, 7 Battle Road, St.Leonard's on Sea, Sussex TN37 7AA, Britio.

* Veganisten Organisatie, Postbus 1087, 6801 BB Arnhem, Nederlando.

* Vegana Societo de Svedio, Kl"verv„gen 6, Mariefred, 64700, Svedio.

* Soci,t, V,geriste de France, 12 all,e Jacques Becker, 93300 Aubervilliers, France.

* Vegan Society (NSW), PO Box 467, Broadway 2007, NSW, Australia.

* American Vegan Society, 501 Old Harding Highway, Malaga, NJ 08328, USA.

VEGETARANAJ SOCIETOJ:

* International Vegetarian Union, Maxwell G. Lee, 10 King's Drive, Marple, Stockport, Cheshire SK6 6NQ.

* European Vegetarian Union, Rob Sneiders, Larenseweg 26; NL 1221 CM Hilversum, Nederlando. (tel.31 35 834 796).

* The Vegetarian Society (UK), Parkdale, Dunham Road, Altrincham, Cheshire WA14 4QG. Britio. (tel.061 928 0793).

ALIAJ INTERNACIAJ SOCIETOJ, adresojn en Anglio:

* Animal Aid, 7 Castle Street, Tonbridge, Kent. TN9 1BH.

* Environmental Investigation Agency, 2nd Floor, 2 Pear Tree Court, London EC1R 0DS. (tel.107 490 7040).

* International Fund for Animal Welfare (IFAW), Tubwell House, New Road, Crowborough, E.Sussex TN6 2QH. (0892.667576).

* World Society for the Protection of Animals (WSPA), 2 Langley Lane, London SW8 1TJ. (tel.071.793.0540).

* Eurogroup for Animal Welfare, c/o RSPCA, Causeway, Horsham, W.Sussex RH12 1HG. (tel. 0403.64181).

* Birdlife International, The Lodge, Sandy, Bedfordshire SG19 2DL (tel.0767.680551).

Britio havas tre multe pliajn bestrajtajn kaj homrajtajn asociojn. 'The Animals' Contact List (La Animaloj Kontakto Listo) havas proksimume 2,000 adresojn de organizoj bestrajtaj au similaj. La kosto estas £2 en Britio. VEGGIES LTD, The Rainbow Centre, 180 Mansfield Road, Nottingham NG1 3HW. (tel.0602 585666)



## TUTMONDA ESPERANTISTA VEGETARANA ASOCIO

TEVA estis fondita en 1908. La unua prezidanto estis L.N.Tolstoj, la fama rusa verkisto, kaj la celo estas "Por reformitaj viv- kaj nutrad-maniero". Momente, ne estas redaktoro - do ne gazeto - tamen, la sekretarino redaktas informan bultenon. Estas multajn landajn reprezentantojn de TEVA, kaj ni sugestas, ke vi skribu al via reprezentanto por eltrovi la kotizon. Alie, skribi al la SEKRETARINO de TEVA - kun internacia respond-kupon.

**Lilia Fabretto, Via Pietro Cartoni 12, 00152 ROMA, Italia.**

| | |
|---|---|
| Albanio | S-ino Rita Permeti; Rruga'4 Deshmoret"P.11/B; Shk,5, ; Ap.20; TIRANE |
| Argentino | S-ino Clare de Hess; Bolivar 6339 1875 WILDE |
| Aŭstralio | Robert Felby; 6 Dorset Street; SEMAPHORE S.A.5010 |
| Oesterreich | Gerard Cool; Leitringerstrasse 53 A-8430-LEIBNITZ (Austrio) |
| Belgie-Belgique | Camiel de Cock; Vorse Beemden 7 2980 ZOERSEL |
| Byelorussio | Yaroslav Ostapuk; Postkesto 11 Aiko Klubo Ryushinkan; MINSK 220029 |
| Bolivio | D-ro Wilhelminne Verhaaf; Postfako Casilla 3945; COCHABAMBA |
| Brasilio | Onei Boracini; Caixa Postal 16; 15001-Sao Jose do Rio Preto-SP |
| Britio | S-ino Pat Search; 30a Arlington Gardens; ATTLEBOROUGH; Norfolk NR17 2NE |
| Bulgario | S-ino Tatiana Encheva; j.k. Ovcha Kupel -1 bl 421 vh A ap5; 1632-SOFIA |
| Danlando | Ejnar Hjorth; Christianagade 38.2; DK-9000 AALBORG |
| Finlando | Lasse Kivisto; Kivistontie SF 055 100 HYVINKAA, Suomi |
| Francio | Jean Roger Chasle; 22 rue de la mairie; F-22650-PLOUBALAY |
| Hispanio | Lluis Armadans; Pl.Sagrada Familia 4, 4t, 3a; BARCELONA |
| Magyar/Hungario | D-rino Maria Papp; Kalvaria 96/D; H-6500-BAJA |
| Irano | S.N. Mozafarri; Postkesto 5935 ; 11365-TEHRAN |
| Irlando | Christopher Fettes; St.Columba's College; DUBLIN 16 |
| Israelo | Mark Steinberg; P.O.K. Postkesto 9137; 31091-HAJFA |
| Italio | Lilia Fabretto; Via Pietro Cartoni 12; 00152-ROMA |
| Nippon/Japanio | David MacGill; Kyoto Syudoin; Momoi-tyo 701-Ohara-Sakyo-ku; 601-12-KYOTO |
| Kanado | Normand Fleury; 6358 rue de Bordeaux; H2G 2R8 MONTREAL |
| Kolumbio | Prof.Rafael Antonio Mejia; Apartado A; 9914-CALI(V) |
| Koreo | Jong-gin GIM; Chon An; Postkesto POB 5 CHON-AN SI 330 600 Chung nam |
| Kubo | Adv.Orlando Raolo Gonzales; Lenga 220 apt.5; Mantilla; 13800 LA HABANA |
| Nederlando | TEVAN; Postfako 399; NL3740 AJ BAARN |
| Norge(Norvegio | Kjell Peder Hoff; Bjorkenes; N-1970 HEMNES I HOLAND |
| Nov Zelando | S-ino Stephanie May; 18 Ngata Grove; Trentham; UPPER HUTT |
| Pakistano | S.A. Farani; K-18 Machine Mohalla 3; JHELIUM |
| Peru | Ing. P.F.Camacho Daza; El Boulevard 131 Monterrico; LIMA 33 |
| Polska/Polando | Mag.Ing.Antonio Cybulski; Kosiuszki 24; PL-89-632-BRUZY |
| Portugalo | Portugala E-Asocio; rua Dr.Joao Couto 6 r/cA; 1500-LISBOA |
| Romanio | S-ino Florina A. Bolos; Str.Padin 25-B1 D6 ap 68; 34100-CLUJ-NAPOKA |
| Suid Afriko | D-ro J.P. Hammes; Postkesto POB 40225 Arcadia; 0007-PRETORIA |
| Sverige/Svedio | Henrik Karlson; Fimongatan 12; S-590 40 KISA |
| Thailando | Pho Thamkhajadpaikun; 42 Ari Samphan 5; Rama 6 rd Phya Thai; 10400-BANGKOK |
| Slovenska Republiko | S-ino Olga Novotna; Riznerova 2; 81101-BRATISLAVA |
| Helvetia/Svislando | D-ro Ueli Haemmi; Birkenstr. 19; CH-3052-ZOLLIKOFEN |
| Togo | Koffi Gbeglo; Postkesto PB 13 169 Nyekonakpoe TG-LOME |
| Tunisienne/Tunizio | Abderrazak Tabka; Rue Bizerta 72bis; 4070 M'SAKEN Rep. |
| USA/ Usono | S-ino Maya Kennedy; 669 Coventry Road; KENSINGTON; Ca. 94707 |
| Venezuelo | David G. Valecillos; Calle 79 - 3 C-72; MARACAIBO 4002 |
| Vietnamo | Nguyen Dinh Long; 50/6/9 Nguyen Dinh Chieu P.3 Quan Phu Nhuan THANH PHO HO CHI MINH |
| Zairo | Mfumu Ndongala; Naimba; Postfako BP 1323; KINSAASA I. |

# KIAL ESTI VEGETARANO?

Estas diversaj motivoj por vegetaranigi;

**1; Filozofia kaj etika**

Se vi ne jam konvinkiĝis, ke estas malĝuste suferigi, vidu alineon 2!

* Ĉiuj bestoj spertas emocian suferon kaj doloron.

* Bredi, kapti, teni, transporti, ĉasi, vendi aŭ buĉi bestojn neeviteble suferigas ilin. Ne necesas manĝi ian karnaĵon por esti sana. Tial civilizita homo ne manĝas ian animalan - nek bestojn, nek birdojn, nek fiŝojn.

**2; Socia kaj etika.**

La kulturado de bestoj, birdoj kaj fiŝoj nepre malŝparas terenon, nutraĵon kaj aliajn provizojn.

Bovajmanĝantoj bezonas kvinoble, ofte eĉ plimulte, da terenareo por produkti la saman nutraĵvaloron kiel vegetarano.

Ŝafmanĝantoj malŝparas terenareon, kiun ni bezonas por kultivi alispecajn nutraĵojn kaj ankaŭ arbarojn por komerco, distrado kaj la absorbado de karbono necesa por preventi varmigadon de la terglobo.

Teni porkojn kaj kortbirdojn ankaŭ malsparas utilajn areojn kaj provizojn. kiel ankaŭ la farmado de fiŝoj.

Cetere, dum ni estas malŝparantas terenon por teni bestojn, ni estas importantaj nutraĵon el landoj, kie homoj estas mortantaj pro malsato. Ni bezonas terenon por kreskigi multajn arbojn por la absorbado de la karbonon en la aero kaj kontraŭ batali la varmigon de la atmosfero, kaj por produkti lignon, kaj plibonigi la pejzaĵaron kaj cirkaŭ aĵon.

Sen la fermado de bestoj ne necesas uzi intensivan kultivadon, tial ni havus pli multe da natura nutraĵo.

**3; Sana kaj etika.**

Ne necesas manĝi iajn bestojn por esti sana. Fakte, la sanaŭtoritatuloj konsentas, ke ni ĉiuj prefere manĝu malpli da bestproduktajoj en nia nutrado.

Ni scias, ke vegetaranoj suferas malpli da kanceroj, artrito, gastraj kaj intestinaj malsanoj, kaj kormalsanoj; kaj estas kredate, ke pliboniĝos la okuloj kaj dentoj.

**4; Spirita kaj anima.**

Multaj religioj kredas, ke oni spirite pliboniĝas kiel vegetarano, kaj ĉar ĉiu el ni havas spiriton au animon, oni devas kredi, ke por plibonigi la spiritan staton, oni ne devas kaŭzi al iu senta besto ian difekton au doloron.



**5; Biologia**

La biologia estraro de homo ne estas karnomanĝa. Fakte, la homo estas pli parenca al la primatoj, kiuj kutime ne manĝas viandon - aparte de malofte grupoj aŭ okazoj. Certe, la goriloj malofte manĝas aliajn bestojn.

Estas iom da atestaĵo, kiu sugestas, ke karnomanĝa nutraĵo kaŭzas pluan adrenalinon kaj aliajn hormonojn en la sango, tial oni iĝis pli atakema .... do pli da maltrankviloj ... pli da militoj .....

Plue estas logike kredi, ke la homo kiu respektas la sentojn de bestoj, ankaŭ respektas la sentojn de aliaj homoj. Neniu supozas, ke tio estas ĉiam vera, sed ni rajtas, ke estus kutime. Certe, homoj, kiuj neniel respektas bestojn, probable ne respektas aliajn homojn.

PLUAJ DEMANDOJ PRI VEGETARANISMO

***Bestoj manĝas bestojn. Estas natura manĝi bestojn. Kial ni ne manĝu bestojn?***

Ĉu vi, homo, estas sama kiel besto? Bestoj tre ofte reciproke mortigas samspecajn bestojn; ursoj ursojn, fiŝoj la samspecajn idarojn. Oni povus citi multajn ekzemplojn. La civilizita homo tamen progresis preter kanibalismon, kaj nun venas la tempon por fari pluan pason.

***Fermbestoj malplimultiĝos, eĉ malaperos.***

Fermbestoj naskas ĉar homoj devigas ilin bredi. Neniu imagas, ke la tuta homaro tuj vegetaraniĝos, tial fermbestoj nur iom post iom malplinombriĝos. Fermbestoj ne estas naturaj. La mondo ne bezonas ilin. Homoj pliboniĝus se iliaj hejmoj estus ĉirkaŭ ataj nur de sovaĝaj bestoj.

***Ni havus tre multajn plagojn***

La homoj ne mortigus sovaĝajn bestojn, tial ni havus pli multe da naturaj rabobestoj. Naturo havus pli bonan ekvilibron - malpli multaj plagoj.

***Ni mortigis plantojn, kial do ne bestojn?***

Bestoj suferas doloron kaj maltrankvilon. Ili havas nervosistemon similan al tiu de la homo; kaj hormonojn, kiu portas doloron. Bestoj evoluis por konscii de doloron kaj timon por averti ilin pri danĝero. Plantaj ne havas nervojn, taŭgajn hormonojn aŭ la eblon movigi.

---

Sen fermbestoj, ni havus pli multajn sovaĝajn bestojn; pli multajn arbarojn; pli puran akvon kaj aeron; pli puran nutraĵon; pli bela pejzaĝon.

Sen mortigado, ni havus plimultan kompaton - al homoj kaj bestoj. Ni havus malplimultan atakemon kaj militojn. Ni pli respektus homojn, bestojn kaj la ĉirkaŭan medion.

La vegetaranismo estas nur la unua paŝo al la espero kaj revo al paco, sed ĝi estas necesega paŝo antaŭ ol la homo povos leviĝi spirite super la ceteraj bestoj.

---

## FRAME, kaj la Uzo de Bestoj en Scienco

*Krys Ungar.*

La demando, ĉu uzi bestojn en sciencaj eksperimentoj plej ofte estigas emociajn reagojn. Je unu flanko estas tiuj diras "Ĉu vi lasus vian infanon morti por savi la vivon de rato?", kaj je la alia flanko estas tiuj, kiuj opinias, ke bestoj havas absolutan rajton al senĝena vivo, kiun homoj ne rajtas negi, kaj ke bestoj estas tiom malsimilaj al homoj, ke oni povas lerni nenion valoran el eksperimento de besto.

Kiel scientisto, mi ne intute konsentas kun tiu lasta aserto. Kvankam enbestaj eksperimentoj foje, eĉ ofte, gvidis al erara konkludo, samtempe en kelkaj fakoj la bazaj scioj venis el tia laboro. Ĉu eblas el morala vidpunkto tiel atingi la scion estas tute alia demando. Mi forlasis mian fakon, ĉar mi ne plu kapablis ĉiutage eniri la laboratorion kaj mortigi musojn (kaj jes, poste mi ankaŭ fariĝis vegetarano, kaj nun klopodas evitit ĉiujn bestdevenajn manĝaĵojn!).

Krom diskutoj pri sciencaj esplori, la debato kutime koncernas provojn de kosmetikaĵoj. Estas facile diri, ke ni ne bezonas novajn ingrediencojn, ĉar jam estas tiom da koloroj, tiom da kremoj, ŝampuojn, ktp. Tamen, tia uzo de bestoj jam malkreskis, sendube parte pro la protestoj de aĉetantoj. En 1991 en Britio, al kiu jaro rilatas la plej lastaj haveblaj informoj, oni uzis 3,082 bestojn por tiu celo, 29% malpli ol en 1990. Bedaŭrinde, la kreskanta maltrankvilo rilate la medion, poluadon ktp, kaŭzis pli grandan uzon de bestoj: por esplori pri poluado en 1991 oni uzis 58,224 bestojn, 35% pli ol en 1990, kaj por provi produktaĵojn por la domo (ekz. purigiloj, lesivoj) oni uzis 2,845 bestojn, 92% pli ol 1990. Fakte, tiuj lastaj du kategorioj montris la plej grandan kreskon en la uzado de bestoj. Cetere oni uzis pli da bestoj en 1991 ol en 1990 por edukaj celoj (+15%), por kirurgaj celoj (+14%), por produktado (+4%), por provado de aldonaĵoj al manĝaĵoj (+0.3%) kaj por bredado de genetike ŝanĝitaj bestoj (+17%). Ĉiuj aliaj kategorioj montris malkreskon, ekz. fundamentaj sciencaj esploroj (-2%, kvankam la nombro estis granda - 636,592 bestoj), diagnozo (-15%), provado de agrikulturaj kemiaĵoj (-29%), industriaj kemiaĵoj (-5%), esploroj pri la uzado de tabako (-22% kaj alkoholo (-9%).

Mi opinias, ke la postulo, ke oni tuj ĉesu ĉiun uzon de bestoj en sciencoj estas ne realigebla, ĉar neakceptabla al multaj sciencistoj kaj ankaŭ al la instancoj, kiuj faras la legojn rilate la elprovadon de medikamentoj kaj aliaj kemioĵoj. Mi opinias, ke necesas trovi iom post iom alternativajn metodojn, kaj tiam konvinki tiujn homojn, ke, almenaŭ en kelkaj kazoj, la alternativo metodo povas doni same bonan aŭ eĉ pli bonan rezulton ol la tradicia enbesta metodo. Pro tio, mi akceptis labori profesie por FRAME (Fonduso por la anstataŭigo de bestoj en medicinaj eksperimentoj). FRAME provas pasi laŭ la 'meza' vojo, ne per kondamnoj kaj postuloj, sed per esploroj kaj dialogoj, por instigi la uzon de medotoj, kiuj uzas malpli da bestoj, kaŭzas malpli la suferado, aŭ (la fina celo) entute ne uzas vivantajn bestojn. FRAME faras proprajn laboratoriojn studojn por trovi novajn metodojn sen uzi bestojn, informas sciencistojn, studentojn kaj publikon pri alternativaj metodoj generale, kaj klopodas influi ĉe ĉiuj instancoj, kiuj decidas pri la uzo de bestoj. FRAME agas ankaŭ sur la nivelo de la Europa Komunumo, kaj nia direktoro, Profesoro Michael Balls, jus translokiĝis al Italio por farigi direktoro de la nova Europa Centro por la Validigo de Alternativaj Metodoj. Kelkaj sciencistoj diras, ke ni estas bestprotektaj ekstremistoj, kelkaj bestorajtoj organizaĵoj diras, ke ni estas la pupoj de la kosmetika industrio. Kiam oni estas malamata de ambaŭ esktremoj, tio eble signifas, ke oni estas sur la ĝusta vojo! **Pliajn informojn** de Krys Ungar, FRAME, 34 Stoney St.,Nottingham NG1 1NB, Britio.



## EVENTOJ

**UNIVERSALA KONGRESO;** La plej granda evento en la Esperanto jaro. 78-a U.K. 24-31 Julio 1993, Valencia, Hispanio. Informo de UEA.

**La VII NTERNACIA VEGANA FERIO;** 17-24-a Julio, Tossa De Mar, Girona, Hispanio. Oni atendos 150 homojn. Bedaŭrinde, oni prelegos angle kaj hispane, sed ne esperante. Esperantistoj ĉeestos la ferion. Apogu la Esperantajn ĉeestantojn, kaj montru, ke Esperanto estas la sola justa lingvo por veganoj kaj vegetaranoj, kiuj kredas pri homa justeco.
Informo de; Francisco Martin, Internacia Vegana Ferio, Apartado Postal 38, 127, 28080 MADRID, Hispanio. (tel.34-1-331 99 60)

**La 12a Internacia Literatura Forumo;** 17-21-a Julio 1993, Barcelona, Hispanio. Dedicita al la temo; La literatura kritiko en esperanto: inter estetika universalo kaj poetika relativo. Informo de; UNESKO KLUBO; Str. Mallorca 207; Barcelona, Hispanio. (tel.4539507).

**La 26a KATALUNA KONGRESO DE ESPERANTO;** 4-7-a Decembro, Alcudia, Mallorca, Hispanio. Longa semajnfino de eventoj por Esperantistoj de ĉie. Hispanaj kaj aliaj vegetaranoj ĉeestos! Informo de; Kataluna Esperanto-Asocio; Apartat 290, 0820 SABADELL, Hispanio.

**La UNUA KUNVENO POR LA VEGETARANA ESPERANTO GRUPO (VEGO);** Ni atendas aranĝi kunvenon en Britio dum Septembro aŭ Oktobro por plani pliajn kunvenojn en Eŭropo dum 1994.. Ni benvenos precipe alilandajn samideanojn. Ankaŭ, ni benvenos sugestojn por Eŭropaj kunvenoj dum 1994. Ĉu vi povos aranĝi kunvenon en via lando? Informoj kaj ideoj, skribu aŭ telefonu Brian ĉe VEGO.

**INTERNACIA PACA BURO KONFERENCO;** 7-8-a Oktobro, London, Britio. Informo; IBP Supporters Network, 30 Prince Edward's Road, Lewes, Sussex BN7 1BE, Britio.

**POR PATRINO TERO;** Marŝo de Bruselo, Belgio, je Januaro 1995, al Moskvo; kontraŭ nuklea forto, armilaroj kaj militoj. Informo; Voor Moeder Aarde, Zilverhof 19, B-9000 GENT, Belgio. (tel. +32 9 233 3268)

INTERNACIA BEST-RAJTAJ EVENTOJ

2a Oktobro; Internacia farmbesto tago. (Proksimuma nasktago de Ghandi).
16a Oktobro; Tutmonda Nutraĵo Tago - elmontri la suferon de la malriĉuloj
16a Oktobro; Tutmonda Tago por Kontraŭstari Macdonalds.

EVENTOJ EN BRITIO

3a de Julio; Nacia Ne-karna Marŝo kaj Kolektigo, Manchester. tel.061.953.4039
10a de Julio; Vivi Sen Krueleco, Edinburgh. tel.031.953.4039
28a Augusto; Greenpeace (Verdpaco) Foiro, Londono.
18-24a Oktobro; Nacia Vegetarana Semajno - Multaj eventoj tra la lando.
kaj multaj lokaj eventoj. Informaĵoj de Veggies, Nottingham.(Vidu 'adresoj').

La mondo perdas 5000 kvadrataj metrojn de arbaro ĉiu sekondo!

VEGETARANO; Praktikanto de la dietistika doktrino, kiu malkonsilas nutri sin per io, kio vivis per animala vivo (ekz. la karno de besto aŭ fiŝo), sed permesas la produktojn el la animala regno (lakto, ovoj, mielo, ktp).
VEGETALISTO estas dieta doktrino, derivita el vegetaranismo, kaj permesanta absolute nur la konsumadon de nutraĵoj el la vegetala regno

*(PIV, 1987).*

VEGANO estas vorto uzita ofte signifi 'vegetalisto', sed ĝi ne jam troviĝas en PIV. Oni asertas kelkfoje, ke vegano estas homoj, kiu ne uzas ia ajn bestproduktojn. - por vestoj, mebloj, ktp. Veganismo estas la proksima paŝo supre de vegetaranismo.

## MALLONGOJ

PIV = Plena Ilustrita Vortaro; La plej granda esperanta vortaro, kaj la definitiva referenco pri la vortoj de Esperanto.
UEA = Universala Esperanto-Asocio; la ĉeflokalo de Esperanto.
UK = Universala Kongreso; la plej granda ĉiu-jare internacia kunveno.
KSM = Koresponda Servo Mondskala (Vidu 'Korespondantoj')
TEJO = Tutmonda Esperantista Junulara Organizo.
ILEA = Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.
SAT = Sennacia Asocia Tutmondo (Eldonis PIV)
La Akademio = kontrolas la evoluon kaj uzeco de la lingvo
EAB = Esperanto-Asocio de Britio.

*Laŭ Mia Opinio*; Ni bonvenos viajn mallongajn leterojn pri best/hom-rajtoj, media protektado, ktp. Ni bonvenos ankaŭ viajn artikolojn, rakontojn, informaĵojn pri lokaj kaj internaciaj aferoj.



# ESPERANTAJ RADIAJ DISVASTOJ

| TAG | HORO(UTC) | URBO/LANDO | FREKVENCO(KhZ) |
|---|---|---|---|
| tage | 03.30-04.00 | Badeirantes Brazilio | 11925 |
| dim'o | 04.05-04.30 | Vieno, Austrio | 61555, 13730 |
| Jaudo | 04.40-04.54 | Vatikano | 1631, 7365, 9755 |
| sabato | 07.50-08.00 | Vilnius, Litovo | 9710 |
| dim'o | 08.00-08.30 | Havano, Kubo | 11760 |
| dim'o | 08.30-08.30 | Tallin, Estonio | 1035, 5925 |
| tage | 11.00-11.25 | Pekino, Cinio | 6955, 9480 |
| tage | 13.00-13.25 | Pekino, Cinio | 11650, 11840 |
| dim'o | 13.05-13.30 | Vieno, Austrio | 6155, 13730 |
| tage | 13.30-13.55 | Varsovio, Polando | 1503, 6095, 6135 7145, 7285, 9525 |
| dim'o | 15.00-15.30 | Havano, Kubo | 6180, 9550 11760, 15230 |
| dim'o | 17.30-18.00 | Havano, Kubo | 17705, 17770 |
| dim'o | 20.20-20.29 | Vatikano | 526, 1530, 6245 7250 |
| sab'o | 20.00-20.20 | Roma, Italio | 7275, 9710, 11800 |
| tage | 20.00.20.25 | Pekino, Cinio | 7470, 9965, 15345 |
| jaudo | 20.15-20.30 | Tallin, Estonio | 1035, 5925, 9560 |
| tage | 20.30-20.55 | Varsovio, Polando | 1503, 6095, 6135 7145, 7285, 9525 |
| dim'o | 21.00-21.30 | Havano, Kubo | 17770 |
| tage | 22.30-22.55 | Pekino, Cinio | 9480, 11515 |
| dim'o | 23.30-24.00 | Havano, Kubo | 9550, 11760, 13700 |

Estas 4.000 elsendoj ĉiu-jare el 10 landoj. Skribu al via registaro aŭ radio aŭtoritato, kaj petu programojn en la internacia longvo. Kiam vi aŭdis programon, skribu al la aŭtoritato por montri vian intereson. Unu radia disvastejo ĉesis antaŭ nelonge elsendojn, ĉar ŝajnis al ili, ke tro malmultaj homo interesiĝas.

EAB aŭ via land-asocio provizos pli multajn informaĵojn. Bedaŭrinde, en Britio, ni ne povas aŭdi multe aŭ klare esperantajn radiajn elsendojn.

Verd-paco (Greenpeace) pretendi ke la Norveganoj mortigis kontraulege 900 balenojn dum la lastaj jardeko.

# BOJKOTU NORVEGIO?

Norvegio rekomencas komercan balenkaptado somere 1993. La Internacia Balenkaptado Komisiono (kutime nomigita IWC; International Whaling Commission) kontraŭstaras tute la komercon, sed la Norvegia registaro timas la multajn fiŝkaptistojn kaj balenkaptistojn - kaj estos Norvega Elekto je Septembro 1993.

Kial kontraŭstaras balenkaptadon pli ol fiŝkaptadon, kiu mortigas multe pli multajn bestojn? Eble ne estas logika rezono, sed pripensu;

* Balenoj estas inteligentaj kaj interesaj mambestoj.
* Homoj detruis multajn specojn, kaj nun ni ne povas vidi multajn balenojn.
* Balenoj estas simbolo de la krueleco, la stulta ekspluato kaj la espero de sentemaj homoj tra la Mondo.

Se homaro ne povas lerni protekti tute ĉiujn balenojn, ne estas espero protekti ion ajn. La balenoj estas la komenca punkto.

* Ne aĉetu aĵojn el Norvegio.
* Skribu al via ambasadoro norvega.
* Petu, ke viaj butikoj ne aĉeti aĵojn el Norvegio.
* Petu, ke via geamikoj bojkotu aĵojn el Norvegio.
* Skribu al via gazetoj, ĵurnaloj, ktp. pri la afero.

Estas tre grava tempo. La elekto norvega okazos Septembre, tial ni devas tuj efiki! Ĉiu malgranda agado helpos.

Por gajni pli multe informon, turnu al via loka *GREENPEACE* ('Verdpaco')
- au skribu; **Greenpeace, Canonbury Villas, London N1 2PN, Britio.**

(Ne forgesu respondkupon! Greenpeace mankas monon).

## kaj la FARAJ INSULOJ!

La fiŝkaptistoj de la 'Faroese' Insuloj daŭros morti kruelege la grandajn delfinojn nomigita '*Globicephala*', kaj multaj bestrajtaj organizoj petas vin persvadi viajn amikojn; ne aĉeti fiŝojn au aliajn aĵojn farajn.



tra la mondo

RUSLANDO;

* Eble 7mil homoj mortis per la Ĉernobil akcidento, kaj 20 mil ruslandanoj ricevis altajn kvantojn de radieco, do multaj homoj mortos. (laŭ Vladimir Ĉemusenko, kiu estis la estro dum la purigado)

* Aleksaj Yablokov, registaro konsilisto pretendas, ke 20% el Ruslandanoj loĝas en ekologiaj katastrofaj lokoj, kaj plian 40% en ekologiaj nefavoraj lokoj. Ekzemple, la Aralo Maro havas altajn nivelojn de kloakaĵo kaj pestmortiloj. Enfanaj mortoj estas 11%, Afriko = 10.9%, Hindio = 9.5%; Ĉinio = 3.7%.

* Gorbaĉov, eksprezidanto, pretendas ke li ne sciis pri la dispono de nukleara forĵetaĵo kaj ekipaĵo en la maro, kaj li aprobis elspezi 5M rublojn por reklamaton.

BRITIO

* La registaro proponas multe novajn ŝoseojn, kaj ne subtenis multe la rekomendojn de RIO dum la lasta jaro.

* La plaĝoj de Britio iĝis pli pura dum la lastaj kelkaj jaroj. Estas bona por la feriuloj, kaj la marbordaj loĝantaroj.

* AKVO en Britio; la meza homo uzas 120 litrojn ĉiu-tage.

aferojn el via lando. Sendu erojn el gazetoj, jurnaloj, folietoj, ktp.

* Komencis la plej grandan elektr-generatoran akva-radon en la Mondo en Kimrio dum 1993 - sufiĉan elektron por 100 domoj.

* La Aŭtomobilo Asocio (AA) kontraŭas la anoncojn, kiuj elmontras rapidajn aŭtomobilojn esti dezirindaj.

* Akvolokoj malkreskis al 4% de 1850 al 1990, kaj la uzado de torfo per ĝardenistoj detruas multajn sovaĝajn regionojn.

* Anglio perdos 10 mil hektarojn da marbordo dum 20 jaroj per komercaj kaj feriaj keskadoj.

* La akva arvikolo (Arvicola amphibius) iĝas pli malofta ĉiu-jare, kaj sperto avertis, ke la loĝantaro malkreskos 90% ĝis la jaro 2000, krom se oni helpos ĝin.

* La armeo forlasos baldaŭ Eŭropo, kaj homoj en Britio timas, ke la aga instruado kun aga pafmunicio detruos la pejzaĝon kaj la bestojn kaj plantojn. Nune, la armeo uzas 2.600 tonojn de amunicio jare en Britio.

.... tra la mondo ....

SUD-AMERIKA

* La Kica tribo starigis 'Eko-turismo', do turistoj devas lerni pri la pluvarbaro kaj la produktaĵoj. La lokaj homoj penas eviti la kutimajn turismojn, kie oni havas prostitutuadon, narkotojn, kaj median detruon; sed estas invaduloj, kiu serĉas oron, aŭ kiuj deziras ekspluati.

* YANOMAMI; Multaj homoj el la antikva Yanomami gento mortis, kiam homoj el aliaj lokoj disvastigis malsanojn, kaj ankaŭ batalis kontraŭ la Yanomami por fosi oron.

* BRAZILO; La registaro rigardas la pluv-arbaron per usona spacŝipo.

USONO; Disney konsentis uzi 3.500 hektarojn fari sovaĝan parkon, sed nur se ĝi povas uzi alian sovaĝan loko por konstrui ludparkon.

* Pli multe usonanoj serĉas verdulajn komercojn por investi monon.

AUSTRALIO

* La registaro proponas, ke homoj pagos por viziti la plaĝon, ĉar la polucio per vizitantoj pliiĝas.

Por malboneco daŭri, nur estas necesa por bonaj homoj fari neniun. *Edmund Burke*

BESTRAJTOJ

Oni ne povas ĉiam distingi inter bestrajtoj kaj mediaj protektado, ĉu ne?

* TIGROJ; La penoj de la Hindia registaro por savi la tigrojn sukcesis, sed nun homoj ĉasoŝtelas tigrojn por vendi la ostojn kaj sango por senutilaj kuraciloj. Nune okazas monde nur 7.000 tigroj.

* Ĉasŝtelado minacas multajn specojn; ekzemple la rinocero en Azio kaj Afriko kaj la tigro en Azio por afrodisiakoj (sekso stimulaĵoj); multajn sovaĝajn katojn por peltoj (tigron, leopardon, jaguaron kaj kelkajn malgrandajn katojn); ĉimpanzojn por sciencistaj eksperimentoj; gorilojn kaj ĉimpanzojn por bestĝardenoj kaj turistoj; La 'Panda' (Ailuropoda) en Ĉinio. Multajn specojn ankaŭ perdas la medion, kie ili loĝas, kiam homoj faligas arbarojn, aŭ konstruas vojojn, domojn kaj fabrikejojn, aŭ ŝanĝi sovaĝajn ejojn al farmojn. Estas multaj rakontoj pri ĉi tiuj aferoj tra la mondo.

* La Brita asocio LYNX, kiu kontraŭstaris la utiladon de peltbestoj, venkiĝis lege per granda pelbesto fermo. LYNX bankrotiĝis; tamen la anoj restaras sub la nomo 'Respect for Animals Fellowship', Respekto de Bestoj-Kunularo.



.... tra la mondo ....

* Fiŝkaptistoj en Orknio, Skotlando deziras mortigi 2.000 fokojn, ĉar la fokoj manĝis tro multajn fiŝojn.

* IZREALO: La ĉefa rabeno interdiktis vestaĵojn el bestpeltoj.

* JAPAN; Loka registaro ekhaltis la provizon je katoj kaj hundoj al la universitato por vivisekcio.

* HISPANIO; Dum la Olimpaj Ludoj, nur 2.000 ĉeestis la bovbatalon en Barcelono - nur triona de la enhavo; kaj la bovareno perdis 30 milionoj da pts. je 1991.

* La Sepa Internacia Vegetalista Ferio okazos dum Julio 1993 ĉe Tossa de Mar, kie la loka registaro banis bovbatalojn. Ankaŭ la loka registaro en Tres Cantos, apud Madrid, banis bovbatalon.

* USONO; Bestrajtuloj bojkotas General Motors (Ĝeneralaj Automobiloj), ĉar GM provas rezultojn de karambulojn kun bestoj. La registaro de California regis, ke ĉi tiuj provojn ne estas uzebla en juĝejo.

La produktado de minkpeltoj falis de 4.5 milionoj dum 1989 al 2.4 milionoj dum 1990. Vendado de bestpeltoj en Usono falis 45%.

* BRITIO; vulpĉasado mortigas 20.000 vulpojn ĉiu-jare.

* Multajn buĉistoj fermigis vendejojn, ĉar homoj manĝas malpli bestproduktojn.

* Preskaŭ 30.000 homoj ĉiu-semajne iĝas vegetaranoj; du-trionoj estas virinoj, age 11-24 jaroj. Nune, 1993, estas preskaŭ 4 milionoj da vegetaranoj en Britio. Dum 1985 estis 1.5 milionoj, kaj dum 1945 estis 100.000. Viando-vendoj malkreskis 4% dum 1992.

* Dum 1992, Britio importis (precipe de ĉinio kaj Hindio) 51 tonojn da ĉevalhararo, 50 tonojn da melhararo kaj 2.3K tonojn da porkhararo. Multaj el ĉi tiujn bestoj suferis ege por provizi penikojn. Oni uzas ankaŭ minkojn, skiurojn, kamelojn, ktp.

* Fiŝfermistoj kaj aliaj homoj pafas pli ol 5.000 fokojn jare en Skotlando.

* La gluo de britaj poŝtmarkoj estas de plantoj kaj karbo - ne bestoj.

* SALMONELO; De 1988, oni buĉis 3 milionoj da kortbirdojn por peni halti salmonelon, sed raportoj de malsano kreskis de 40 mil je 1988 al 62 mil je 1992. Laŭ spertulo, oni scias nur dekonon el la kazoj.

.... **tra la mondo** ....

* Amikoj de la Tero (FOE) havas 300+ grupojn; 500 anojn en Birmingham, 4.500 en Skotlando.

* Oni proponas malkreski uzadon de fiŝkaptista plumbaj kugletoj dum kvin jaroj, ĉar ĝi venenas multajn birdojn kaj aliaj bestojn. Kial oni devas atendi kvin jaroj?

* Dum unu sezono, kaj unu loko, oni helpis 700 birdojn kaj kelkaj hundoj, kiuj vundigis aŭ enkaptis per fiŝkaptistaj iloj.

* Ĉiu-jare, 20% Falco peregrinus mortiĝis Britie per pafado, venenado, nestrabado. Britio havas triono el la Europa loĝantaro. Homo, kiu flugigas kolombojn, deziras detrui la falkojn, kiuj ŝatas manĝi kolombojn.

* Britio havas 24 minkajn fermojn.

* 41 anglikanaj episkopoj subtenis kampanjo kontraŭ la peltkomerco.

FISOJ

* Sciencistoj ĉe Universitato de Utrecht, Nederlando, trovis ke fiŝoj havas cerbajn strukturojn kaj doloraj-subpremantajn kemikojn similas al homoj. La sciencisto konkludis ke fiŝoj povas suferi doloron kaj timon.

AFRIKO;

* La registaro de Namibio proponas mortigi 40k fokojn malgrau promeso al IFAW, ke ili ne mortigos la fokojn.

LA OCEANOJ;

Malto starigis premion por stimuladi protektado de la mara medio. La Komitato donos la premion dum 'Puraj Maroj-Semajno', la 8-17a Novembro.

* Nun estas 54 landoj, kiuj subskribis la Trakton de la 1982 UN Konvencio pri la Leĝo de la Maro. Oni bezonas 60 anojn antaŭ la Trakto povas efekiĝi.

---

## Balenkaptado

* INTERNACIE; Balen-obervuloj pagas £44 milionoj jare.

* Nombroj de riveraj delfinoj malkreskas, ĉar fiŝkaptistoj sur la Mekong rivero senintence mortkaptas ilin per retoj, kaj ekspolodajoj.

* Fokeno (marporkoj) en Kanado senintence mortkaptis en netoj ...... ankaŭ in multaj aliaj maroj kaj riveroj.

* En Ogato, Japanio, fiŝkaptistoj prenas turistojn por rigardi la balenoj. Dum 1989, estis 400 turistoj; dum 1992, estis 6.5 mil turistoj; sed la Japanio registaro preferas mortis la balenojn.



## KORESPONDANTOJ

Britaj komencantoj, kiuj deziras korespondi kun vegetaranoj, verduloj kaj aliaj.

* Michael Potter, 33a Galfrid Road, CAMBRIDGE CB5 8ND. (44-jaroj s-ro, eksedz., nekuirita nutraĵo, Jainismo, Hinda lingvo).

* Rozy Stratton, 12 Church Close, Roydon, DISS, Norfolk IP22 3RQ (19 j., f-ino.)

* Linda Wilkinson, 50 Barrington Street, TIVERTON, Devon EX16 6QP. (39 jaroj, s-ino, 4 infanoj, Budhismo, nekuirita nutraĵo, filozofio, organikaj ĝardenado).

* Karen Woolley, 8 Woodlands Road, Great Shelford, CAMBRIDGE CB2 5LW. (32 jaroj, f-ino, studanta radio-terapisto).

Ni petas, skribu simple al ni! Ni deziras lerni Esperanton, kaj ni deziras scii pri aliaj landoj, ideoj kaj agadoj - precipe temoj bestrajtaj kaj homrajtaj.
ALILANDANOJ; Sendu vian nomon, adreson, aĝon, interesojn, ktp. por aldoni al la liston. <u>Kostos al vi neniun!</u> ☺

**Koresponda Servo Mondskala; B.P. 6; F-55000-Longeville en Barrois, Francio.** UEA starigis KSM, kun la celo helpi esperantistojn trovi leteramikojn en la tuta mondo. KSM traktas kaj individuojn, kaj lernejo~~n~~ klasojn pere de la instruisto. La kosto estas tre malgranda; nur du internaciaj respondkuponoj por ĉiu dezirata adreso. Se vi deziras korespondi, sendu la respondkuponojn kun via nomo, adreso, kaj detaloj de viaj interesaj.

*'Eventoj'* aperas dusemajne. Ĝi estas 'Internacia Sendependa Revuo pri la Esperanto-Movado'. Ĝi informos vin pri esperantajn aferojn kaj, kompreneble, eventojn. Enhavas nomojn de homoj, kiu deziras korespondi. Petu senpagan provekzempleron de; ***Eventoj*, pk 87, H-1675 BUDAPEST; Hungario.**

*'KONTAKTO'*, 'la plej vasta legata junulara gazeto; rekomendinda por komencantoj; bela kaj moderna; diversa kaj amuza; interesa por ĉiuj. Ĉiu numero havas ankaŭ tekstojn en tre facila lingvo. La plej bona por komencantoj! Kostos; 29.15 guildenoj de UEA (au, en Britio, £9 de EAB).

**Vegetarana Esperanto Grupo** estas angla grupo, kiu deziras helpi alilandajn samideanojn por disvastigi informojn, sciojn kaj komprenon de bestrajtoj kaj homrajtoj.
Ni ne konkuras kun TEVA (Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio), kiu estis fondita en 1908. Fakte, ni deziras subteni TEVA, sed ni diferencas nur per la graveco de mediaj temoj, kaj ni atendos, ke plej multaj membroj estos britanoj.

*VEGO* estas gazeto, kiu ekzistas precipe por informi ĉiujn pri temoj mediaj kaj best/hom-rajtoj. Kvar eldonoj jare.
V.E.G. kaj VEGO kunlaboros. Kiam vi abonas al VEGO, vi estas aŭtomate ano de V.E.G.
Kvankam, oni povas kotizi al V.E.G. sen ricevanta VEGO - precipe por la homoj, kiuj deziras subteni la ideojn, sed ne deziras lerni Esperanton.
<u>KOSTOS;</u>
VEGO; £5, au proks. en via mono, por 4 eldonoj. Aŭ £15 por 12 eldonoj.
V.E.G. (sen VEGO); £5 por 3 jaroj. Anoj ricevos 2-jare, anglan lingvon bultenon. *(Ĉekoj al VEGO, aŭ sendu monbiletojn - se ne kontraŭleĝa).

SED; Se vi loĝas en malriĉa lando, kaj la abono estas tro multekosta, diru al ni, kaj ni penos helpi. Aliflanke, se vi povas pagas pli multe por helpi la alilandajn samideanojn, ni rezervos fondon por la homoj en malpli riĉaj landoj. Ni helpu unu la alian! Notu! La britana gajnas £5 per duonhoro tasko; la ghanano, devas labori dum duontago.
*VEGO* povos helpi samideanojn, kondiĉe ke okcidentaj eŭropeananoj apogos sufiĉe nin per abonojn.

NOTU; Ni deziros kunvenejon je Septembro au Oktobro en Britio - loko kie kelkaj homoj povos dormi, mangi, paroladi.
Ĉu vi volos ĉeesti? Sendu kovrilo kun poŝtmarko por informo.

BRITANOJ; We need a meeting place in September/October - a place where we can sleep, eat, discuss. Perhaps a dozen people? Any ideas?
Send an sae if you'd like details of the meeting. We could meet here, in Clwyd, but maybe the Midlands would be more convenient for more people.

**<u>ADRESON;</u> Brian W.Burnett, Nant Yr Hafod Cottage, LLANDEGLA, Clwyd LL11 3BG, Kimrio, Britio. (tel; 0978.88442).**